

# Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



simbolmarko de la UK 2014

## Niaj Klasoj kaj Kursoj

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; oni lernas jen legante artikolojn, jen verkante, jan tradukante / (2) Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / (3) Jokohama Salono / (4) Daŭriga kurso

\*Regula Klaso en merkredo por legado de "Barbro kaj Eriko".

## Nova Komitatano

Aliĝis s-ro Fuse Kentarou, kaj nun ni havas 7 plenum-komitatanojn. Ili kunsidas principe en la monato fina sabato, post lernado en regulaj klasoj.

## Rudimenta Kurso Komencota

De la 19a de aprilo ni havos rudimentan kurson, kun "Hanako lernas Esperanton" kiel lernolibro, en la samaj horoj kiel de la regulaj klasoj.

## TIEL OKAZIS

### Foiro de la Civitanaj Agadoj

\*la 8-a kaj 9-a de marto, 10h00-15h00, ĉe la regula kunvenejo

Multaj rondoj uzantaj la regulan kunvenejon, kiu estas la gubernia posedaĵo por civitanaj agadoj, ekspoziciis sian agadon, kaj ankaŭ ni.

### Pri Argentino, en Hama-Ronda Vespero

\*la 15-a de marto, 17h00-19h00, ĉe la regula kunvenejo

Pri la ĉi-jara kongresa lando Argentino kaj la urbo Bonaero, prezentis kelkaj el la lernantoj en Jokohama Salono --- ĉiuj ne estas spertuloj, sed ili prezentis sian esploraĵon, kaj 13 aŭskultis.

S-ino Aida Yayoi ĝenerale pri la lando, s-ro Tanigawa Hiroshi pri tango, s-ro Koyama Takesi pri la historio de la lando, kaj s-ro Iwaya Mituru pri la Esperanto-movado de la lando.

## NIAJ PLANOJ

### Venontaj Hama-Rondaj Vesperoj

\*la 19-a de aprilo, 17h00-19h00

Pri *Afriko kaj Esperanto* parolos s-ino Doi Ĉieko, japane. Ankaŭ okazos *kurseto pri la hispana lingvo*, fare de s-ino Motoyoshi Akiko.

\*la 17-a de majo, 17h00-19h00

Pri *la itala urbo Bolonjo* parolos s-ro Glauco Pompilio, Esperante.

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti  
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458  
 ■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>  
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## ESEOJ

## “Hejme en la Mondo” la Kunlabora Muzikfesto de Aŝinaga-Ikueikai

(marto, la 13an en la Urbo Sendai, la 20an en Tokio)

TANIGAWA Hiroshi

Ĝuste je la 3-jara datreveno de la Granda Tertremo kaj Cunamo en la Orient-Norda Distrikto okazis la titolita Muzikfesto.

Ĉi tiun Muzikfeston organizis *Aŝinaga-Ikueikai* (mallonge “*Aŝinaga*”, Organizo por Stipendio Longkrurula. Vidu la martan numeron.), celante la mondon kie ĉiuj orfoj povu senti sin hejme.

La nomo “*Aŝinaga*” devenas de la anglalingva novelo “*Daddy-Long-Legs*” (Onĉjo-Longkrurulo). Ĉiun aktivecon de *Aŝinaga Ikueikai* subtenas la monoferoj de la Onĉjoj-*Aŝinaga*.

*Aŝinaga* helpadis orfojn dum pli ol 40 jaroj stipendianta ilin, kaj post la 2011-marta Tertremego rapide monhelpis la tertrem-cunamo-orfojn kaj iliajn protektantojn. Kaj ĝi nun konstruas 3 zorgodomojn nomitajn “ĉielarka domo”. La profunde psike damaĝitaj geknaboj vizitos la domojn, kie la trejnitaj terapiistoj varme akceptos ilin. Aktualan efekton pruvas la Ĉielarka Domo en Kobe.

Interalie, *Aŝinaga* fondis en Ugando, Afriko en 2004 privatan lernejon nomitan *terakoj*. Por orfoj edukiĝo gravegas! *Aŝinaga* komencis helpi la orfojn studi en japanaj universitatoj, i.a. Waseda, ICU, Sophia, Doshisha k.a. Ekde 2006 jam 36 eksterlandaj orfoj studis kaj nun studas en japanaj universitatoj.

Aparte menciindas, ke Vassar-Kolegio, unu el la plej famaj kolegioj en Usono grave helpas la aktivecon de *Aŝinaga*. Ĉi-fojan Muzikfeston *Aŝinaga* organizis kunlabore kun Vassar-Kolegio, ĉe kiu la aŭtorino de la novelo “*Daddy-Long-Legs*”, Jean Webster (1876~1916) lernis.

Kun tia fono la Muzikfesto estis okazigita. Monde konata reĝisoro John Caird mirige majstre koincide surscenigis jenajn 3 grupojn.

(1) Japan-tamtama grupo de la cunamo-orfoj kaj la kolegoj

(2) Uganda orfo-grupo de afrikaj dancoj kaj muziko

(3) Koruso de studentoj de Vassar-Kolegio

La prezentadoj estis surprize kortuŝaj kaj en la urbo Sendai, kaj en Tokio. (Mi ĝuis ambaŭ prezentadojn.) Vere, la “bonkoro” de la socio kaj de la mondo varme interbrakumas la orfojn peneg vivantaj kun akre damaĝita psiko. Kaj tiu “bonkoro” kreskigas en ilia koro forton kaj grandan amsenton, mi konstatis.

S-ro MAKINO Micuo, membro de Jokohama Esp-Rondo, gvidanto de la koruso de ĝi, aprezis la prezentadon en Tokio, kaj poste skribis emocioplene jene;

© La kunlabora Muzikfesto en Tokio estis vere kortuŝega.

© Mirige belaj estis la voĉoj de la Vassar-koruso kaj de la ugandaj geknaboj.

© La mesaĝo de la uganda knabo estis impresdona. “En estonteco mi volas studi medicinon, savi multajn homojn suferantajn pro malsano kaj malriĉo.”

© Estis surprize ankaŭ, ke la usonaj, ugandaj, jen ĉiuj prezentantoj kune korusis japanlingve la kanton “Floroj Ekfloros”. Mi pensis, ke ne estus nura sonĝo, ke eksterlandanoj kantos japanlingve la kanton “Rekviemo”-n.

© La fina saluto de la prezidanto de *Aŝinaga*; “La feliĉo de homoj postlasitaj sur la fundo de mizero komenciĝas per eduko.” Tio korbatis min kaj rememorigis al mi miajn mizeregajn tagojn post la mondomilito.



## Vizito al la urboj atakitaj de granda cunamo (3)

— Suplemento de la urbo Jamada —

KOYAMA Takesi

Post 2 semajnoj mi aranĝis vojaĝajn dokumentojn kaj mi elprenis la rompitan speguleton, kiun mi trovis en la rubaĵoj sur ĝardeno de malaperinta domo pro la granda cunamo, el pakita flugfolio. Mi unue rimarkis la frazojn sur la flugfolio. Ĝi estis libroflugfolio: “Ligiteco trans spactempo” \* ”Nederlanda interŝanĝa historio, kiu komenciĝis de la golfeto Jamada” \*\* kaj “Ĉu vi scias la akcidenton pri la ŝipo Breskens?” \*\*\*

Mi tute ne sciis pri la akcidento, kompreneble ankaŭ la golfeto Jamada. Sed mi tiam havis intereson pri la rilato inter Nederlando kaj Jamada. Do mi mendis la libron.

Laŭ la libro :

En junio 1643 la nederlanda ŝipo Breskens alfloris la golfeton Jamada. La vilaĝanoj surpriziĝis de eksterlandanoj, kiuj tute subite alvenis pro tajfuno, sed ili bonvenigis surlandajn nederlandanojn kaj donis akvon kaj manĝaĵon. Post unu monato kaj duono la ŝipo denove alvenis al la vilaĝo, sed la ŝipestro kaj 9 ŝipistoj estis arestitaj de loka registaro, Ĉar Japanio tiam kompletigis severe izolismojn kaj la enlandiĝo

de fremdulo estis malpermesita. Tio estis tre grava afero por tiama japana registaro Tokugaŭa. Sed post 5 monatoj ili liberiĝis neniiginte dubon, ĉar ili ne estis misiistoj de Portugalio kaj Hispanio, sed ŝipistoj de Nederlando.

Post 350 jaroj, en 1993 la urbo Jamada kaj la urbo Zeist en Nederlando komencis interfluan de kulturoj kaj oni nomis la insuleton “Nederlanda insulo”. Poste kelkaj lernantoj de elementa kaj meza lernejoj en Jamada ĉiujare vizitis volontulan familion kaj spertis vivon de Nederlando. En 2000 Jamada kaj Zeist fariĝis ĝemelurboj.

Unu ŝipo Breskens de Nederlando ligis 2 urbetojn tre malproksimajn pro tajfuno, la peceto de rompita spegulo gvidis min al la historieto de la urbo Jamada. Do ĝi aliĝis al unu el neforgeseblaj urboj por mi.

\* 時空を超えた絆

\*\* 山田浦から始まるオランダ交流物語

\*\*\* 君はブレスケンス号事件を知っているか

## Ankoraŭ ne esperantigitaj Fabeloj de Eroŝenko

Murata Kazuyo

Vasilij Eroŝenko (1890-1952) verkis multajn fabelojn en la japana lingvo, kiam li loĝis en Japanio en la jaroj de 1916 ĝis 1922. Inter ili troviĝas 16 rakontoj, kiuj estas ankoraŭ ne esperantigitaj. Kiel konate s-ro Mine Yoshitaka estas eminentulo pri Eroŝenko. Sed bedaŭrinde nun li estas malsana kaj ne povas fari tradukon. Mi petis kelkajn veteranajn esperantistojn pri tradukado, sed ĉiuj rifuzis dirante, ke ili ne havas kapablon fari tion.

En 2011 mi proponis komune traduki ilin en nia Jokohama Salono, kaj tri rakontoj estis tradukitaj kaj publikigitaj en nia organo “Novaĵoj Tamtamas”. Poste mi mem tradukis 2 kaj daŭrigas plu.

Jam 10 jarojn antaŭe, s-ino Julija Patlanj, studanto de Eroŝenko en Ukrainio, verkis en revuo KONTAKTO pri li. Laŭ ŝi, en la jaro 1962, 1977 (en Rusio) kaj 1969 (en Ukrainio), oni eldonis liajn verkojn. Inter ili estas kelkaj fabeloj, kiuj estis tradukitaj de la japana aŭ de la ĉina lingvoj en la rusan, aŭ en la ukrainan lingvojn.

Estus bone, ke almenaŭ samlandanoj povas legi liajn fabelojn, kaj havas eblecon traduki ilin en E-on.

Nun ankoraŭ restas 7 rakontoj ne esperantigitaj. Se mi ne daŭre traktas pri ili, neniu faros tion, kaj oni forgesos pri japanlingvaj fabeloj de Eroŝenko. Pro tio, kvankam mi tute ne havas kapablon bone traduki ilin, mi decidis fari laŭeble pli frue. Por tio mi deziras koncentriĝi pri Eroŝenko. De nun mi devas legi multajn librojn pri Eroŝenko kaj liajn fabelojn.

Feliĉe ges-roj Sibayama proponis kunlabori kun mi. S-ino Sibayama Noriko planas traduki “Morto de Kanario”, kaj s-ro Sibayama celas traduki “Zinrui no Tame ni” (Por homaro). Nun mi petas s-ron Tanabe Kunio traduki la rakonton “Ŝipo de feliĉo” (*Kouhuku no hune*)

Krome en 2012, okaze de la 120 jara datreveno de lia naskiĝo, naskiĝis nova interesato, s-ro Hikita Akio. Li estas eks-estro de Blindula lernejo, kie iam Eroŝenko lernis kiam li estis 24-jaraĝa. S-ro Hikita tre fervore lernas Esperanton kaj aktivas en diversaj kampoj en esperantujo. Do li estas stelo de espero por mi.

Mi petas de vi ĉiuj, bonvole doni konsilon aŭ kunlabori kun mi.

---



---

## 94a Legokunsido

---



---

En la 1-a de marto okazis legokunsido kun 5 venintoj. La titolo de la legita libro estas “Poemoj de Armand Su”.

### Poemoj de Armand Su

Mizro Iwaya

Esperanta literaturo ne estas en plene maturiĝinta stadio. En tia okazo la poemo ludas gravan rolon. Ni povas vidi ankaŭ en Japanio, ke la unua literaturaĵo aperis en la formo de poemoj. Do ni preferinde familiariĝu al esperanta poezio, kvankam ni ĝis nun ne surtabuligis ĝin en nia legokunsido.

Tiu ĉi estas la unua poemaro en nia legokunsido. Antaŭ ĉio ĝi estas simpla, sed ĝi ne perdas kvaliton de la poezio. Ni ofte vidas ke aziaj verkistoj havas saman tendencon kiel ni Japanoj. Ankaŭ ĉina poeto Armand Su havas komunan bazon de la kulturo kun ni. Tia tendenco troviĝas ne nur en poemoj, sed ankaŭ en nia ĉiutaga konversacio laŭ nia sperto kun lokaj esperantistoj. Tial ni povas facile komunikiĝi kun azianoj per la internacia lingvo. Mi vidas ke la selekto de tiu libro havas specifan meriton en ni.

La antaŭparolo diras ke la aŭtoro estis kortuŝita de “Printempo en la aŭtuno” de Julio Baghy. Ĝi estas dolĉa kaj romantika verko. Tio signifas ke ankaŭ Armand Su havas komunan tendencon. Vi trovas tiun fakton tuj ĉe la eklego. En “Miaj junaj kantoj” li ofte esprimas sian sopiron al la amo mem. Jen dolĉa fantazio. Sed ni ne misjuĝu la esencon de la poemaro. Dum la plulegado vi trovos, ke li kapablas versigi profundan suferon de homa vivo, ĉar li mem suferis multon dum la Granda Kultura Revolucio. Ni japanoj vidas ĝin historia okazaĵo de ekstere, sed interna sperto estis super nia imago. Li estis denunciata pro la “internacieca” karaktero. Lia tajpilo estis konfiskita kaj li estis arestita. Lia sorto estis vere mizera. Sed samtempe ni devas danki al la Ruĝaj Gvardianoj ĉar ilia rigora konduto donis al li novan ŝancon verki akran akuzon. Poste li estis senkulpigita kaj eĉ fariĝis komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo. Liaj amikoj klopodis kolekti la pecojn de liaj verkoj, kaj fine sukcesis eldoni ilin en tiu poemaro por ke ni

alilandanoj povu enmanigi kaj legi ĝin.

Se vi ankoraŭ ne bone ĝuis esperantan poemaron, mi rekomendas tiun libron al vi. Ĝi estas facila sed esence enhavas spiriton de esperanta poezio.



### Armand Su, aŭ ĉina IU (Ito Saburo)

Sibayama Zyun'iti

Estas kolekto de facil-legaj poemoj.

Kiam mi konatiĝis kun esperanta poezio en 1970-aj jaroj, mi aŭdis, ke en Ĉinio estas talenta esperanta poeto, sed ne multe konis pri li. Ja tiam li estis persekutita de la Granda Kultura Revolucio, kiel ŝtatperfidulo. Nu, lia figuro, kun lirikaj kaj simplaj poemoj, memorigas al mi japanan esperantan poeton plumnome IU, aŭ Ito Saburo. Tiu debutis en 1930aj jaroj, sed poste dum la milita periodo li estis arestita pro internacia agado pere de Esperanto.

Ni posteuloj nun povas legi poemojn de Armand Su kolektitajn kaj publikigitajn en 1992, kvankam jam li estis forpasinta en 1990. Sed estas kortuŝe ke Ĉina Esperanto-Eldonejo honorigis lin per bela broŝuro. La poemaro ne estas aranĝita laŭ tempa ordo, do komence ne venas la lirikaĵoj, kiuj impresis Julion Baghy. Ĝi komenciĝas je la poemoj, ode al la amata patrolando Ĉinio. Ĉu tio estas laŭ la pure estetika aranĝo de la kompilintoj? Eble ĝi estas odo de la kompilintoj, kiuj kredeble ankaŭ pasigis nefacilan tempon kiel esperantisto en Ĉinio.

La ilustraĵo estas prenita el “Poemoj de Armand Su”